

31 Bd Mariette
Boulogne s/M
Pas-de-Calais
France
27 Juin 1923

Très cher Monsieur,

Jen mi komencis france sen atenti. Sed vi komprenos + tio estos nenio, n' est-ce-pas? ¹

Kun tre granda plezuro + iom da surprizo mi vidis vian ŝatindan manskribon. Mi certe kredis ke vi forlasis la korespondon kun mi. Tamen mi tut'kore dankas vin por via afabla + tre interesa letero, sed mi profunde bedaŭras tion kion vi skribas pri via Eveto. Samtempe mi esperas ke tio estos pli rapide kuracita ol vi pensas + ankaŭ mi kredas ke vi ambaŭ venos dum la tuta kongreso malgraŭ viaj timoj ne povi veni. Post unu monato vi tiel al kutimiĝos al infano kuŝata ke vi eble povos lasi ŝin kun la samaj personoj ĉe kiuj ŝi devis iri, dum via foresto.

Estos malpli da danĝero por infano kiu ne povas manĝi² ol por infano normala kiu kuras. Sendube ŝi ne suferos – do? Ne kredu ke mi ne havas bonkoron sed pri tio mi povas paroli kun sperto ... ĉar kiam mia filo estis 5 jara mi pasigis 2 terurajn jaroj – li ŝajnis lama + suferis en la kokso kiam li marŝis. Oni ordonis ke oni portu lin + ne permesu la marŝadon – poste, oni devis meti lin en ligna lito dum kelkaj monatoj – timante koksomalsanon. Ho! Kion³ mi suferis. Poste, li bone marŝis + neniam plu suferis. Nun, li estas tre bela + ludas ĉiujn sportojn + estas konata kiel ĉampiono de teniso!

Li estis tute facila zorgi, kuŝata en la lito + neniam poste la kuŝado suferis. Sed, en la komenco oni suferas + estas impresata pro la malbona sorto. Oni ĉiam suferas kiam ĝia infano estas malsana. Kaj mi estis tiel juna!! Do, trankviliĝu, kara korespondanto + provu ambaŭ veni la Kongreson.

Estas tiel longe de post la ricevo de via lasta letero ke mi ne scias bone ĉu mi diris al vi pri mia foriro al N. La vicprezidanto D^{ro} Orthal skribis al mi ke post speciala kunveno de la L.K.K. pri tio, ili fine decidis ke estus pli bone ke ni ne venu. Korespondantoj miaj en Wiesbaden + Leipzig estis koleraj pri tiu decido (opiniante ke estus malbone por la Kongreso). Metis l'aferon en la manoj de la Esp. Institucio de la Germ. Respubliko kiu oficiale traktos l'aferon kun la L.K.K.!!!! Do, mi esperas tamen iri malgraŭ la tre certaj malfacilaĵoj ĉar ni ne parolas Germ. + nuntempe pro la Ruhr Germ. malamegas Francojn. Mi mem ĉiam povas peti ion⁴ angla lingvo, sed mia edzo?

Estos stranga sperto por mi esti meze de tiom da malamikoj !!!!

Mi devas renkonti en N. nekonatan korespondanton mian + mi neniam vidis lian portreton!!! D^{ro} Brodero el Varsovio, d^{ro} en filozofio – industria komercisto. Eble vi vidis anoncon lian en Internacia komerco (N^o 2) kie li petis oficon iun ajn en komercado. Mi ne scias ĉu li estas juna aŭ maljuna – mi scias nenion – vole. Ankaŭ S^{ron} Walter Lippman el Leipzig kiu estas⁵ tre ĉarma por mi en Praha, ĉe insulo Zofin. Li skribas ofte nun precipe pri nia alveno al N.

Nature mi ankaŭ esperas vidi D^{ron} Leono Zamenhof kiu ĉiam korespondas kun mi. Estas vere ke mi ofte ricevis Esp. leterojn. Sed de via lando neniun escepte de tempo al tempo maloftan leteron de vi. Nature mi senkulpigas vin ĉar mi komprenas.

Hieraŭ mi legis la programon de la 15a. Bela + bone organizita ĝi ŝajnas + mi ĉagreniĝas tre forte se mi ne povos ĉeesti.

Ne atentu mian malbonan manskribon sed mi ĵus ludis tenison dum 1 horo 1/2 por la unua foje tiun jaron + mia mano tremas (ĉar mi tre bone ludis + gajnis). Dimanĉon, mi ludis golfon por la 1^a foje + mi tute ne scias

¹ **Nota de Alice margène:** Mi ne tralegis – senkulpigu erarojn + forgesaĵojn

² Ĉu "marŝi" ?

³ Ĉu "kiom" ?

⁴ Mankas "en la"

⁵ Ĉu "estis" ?

ludi sed mi volas lerni por havi iun ajn sporton dum la vintro. La Zamenhofa familio + aliaj Ploj + eĉ Ĉekoj miris multe kiel la Francoj aranĝas sian vivon por la laboro + la sporto ankaŭ. Mi vivas vivon tiel okupatan + faras tiom da malsimilaĵoj. Hieraŭ mi plenumis la ekzamenon de la ĉambro de Komercio de Londono Angle-Esp. Ne estos oficiale ĉar oni devas esti en Londono – oni sendis la dokumentojn al mi. Ĝi estas tre malfacila.

Mi ne komprenas kiam vi diras ke vi legas mian : "Tout passe, tout ..." Kial mian? Kio estas?

Mi estas iom surprizata kiam vi diras ke vi konservos pli bonan memoron de la Berna Kongreso ol de la Praha !!! Mi ne povas eĉ kompari ilin. Praha por mi estis tiel bela ĉia maniere ke neniam mi forgesos ĝin. Berno tute ne markos en mia vivo. Eble Praha estas same por vi ĉar ĝi estis ĉe vi en via lando + nenio fremda povis impresigi vin ?? Tamen viaj vortoj mirigis min.

Dankon grandan por viaj P.K. el Nymburk + ĉiujn subskribaĵojn + la leono Bohema.

Vere estas tio kion vi diras pri malfeliĉo en la homa vivo sed, tamen ekzistas "la espero" + oni devas vidi ĉion en la bona flanko. Ofte, boneco devenas el malbono – do, esperu ĉiam + ĉio aranĝiĝos.

Mi esperas ke en la venonta Kongreso ekzistos nigra tabulo sur kiu oni povas skribi sian nomon + sian adreson⁶ al kiu oni volas ... ĉar trekredeble⁷ vi ne plu skribos al mi antaŭ + ne mi al vi, do ni ne scios ĉu ni ĉeestos jes aŭ ne. Do, se tiu tabulo ekzistos en la skribejo aŭ poŝtoŭicejo, mi skribos sur ĝi kie vi povos trovi min – ĉar tre certe meze da tiom da kongresanoj oni ne retrovos unu la alian.

Ĉu vi ŝanĝiĝis? Mi iom dikiĝis mi pensas + nun mi pezas 60 kilogramojn aŭ preskaŭ. Tamen, vi povos rekoni min. Mi kredas ke mi ne vidis D^{ron} Leono Zamenhof de 15 jaroj!!!

Mi ne vere envas tiujn homojn kiuj ne havas idealon + vivas nur por si mem. Ne estas la vera feliĉo kiun ili ĝuis⁸

Ĉu vi estas tre okupata pri viaj aferoj? Estas terure por mia edzo – mi ne povas paroli al li – li ne havas tempon + li estas tiel laca ĉiam. Mi ĉiam timegas por lia sano. Li ne havas eĉ 5 minutojn sen labori – krom la teniso kiu estas absolute necesa. Mi devas respondi al ĉiuj leteroj liaj krom por la aferoj.

Kiel vi mi adoras (amegas) la sunon. Ĉio estas ŝanĝata se ĝiaj radioj. Sed, tamen sur la pontoj sur la Moldava je la 2^a horo, marŝante, mi ne ŝatas. Ho, kiel estis varmege en Praha! Neniam mi suferis pro varmege kiel en tiu vojaĝo al Praha + poste dum la Kongreso!!

Mi kunsendas foton de mia granda filo kiun oni nomas mia frato. Tiel ofte oni prenas nin por gefratoj. Tiu-ĉi estis prenita antaŭ unu monato. Kiel grandulo maljunigas la "Maman" - mi ne povas kredi ke li apartenas vere al mi.

Nun, kara korespondanto, mi forlasos vin petante vin transdoni al via edzino ĉiun mian simpation por la malsano de Eva. Tamen mi esperas ke vi ambaŭ venos al N. + se ne estos eble vi ambaŭ, unu el vi, dum la tuta semajno Kongreso.⁹

Se mi povos iri, mi iros + tiam mi esperas havi la ĝojon vin renkonti.

Atendante tiun plezuron, mi de nove, petas vian pardonon pri la malbona skuata manskribo + sendas al vi mian sinceran dankemecon + amikecon

Acie Sergeant

6 leteroj atendas ke mi respondu, sed mi volis skribi tuj al vi por diri al vi kiom mi simpatias kun vi ambaŭ.

⁶ adreson

⁷ tre kredeble

⁸ Ĉu "ĝuas" ?

⁹ ĉu "semajno Kongresa"?